

ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2006/2

aŭtuno/vintro 2006

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

LUMO



Esperanto-Rondo de Toronto 100-jara !
(kaj malkovro pri la historio de KEA) (pĝ 7)



WIKIPEDIO
La libera enciklopedio

Lernu Esperante pri Kanado per Vikipedio ! (pĝ 11)

Lumon eldonas dufoje en jaro KEA, P.O.Box 2159, Sidney (BC) Kanado V8L 3S6 < www.esperanto.ca/kea/ >
Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association
Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

ENHAVO DE LA NUMERO

Agado de la kanada Esperanto-movado

Dudek Jaroj de <i>Inter Ni</i> (B. Williamson).....	3
Kvara MeKaRo (M. Benoit).....	4
Mez-Kanada Renkontiĝo (K. Price).....	5
100-jariĝo de Esperanto-klubo en Toronto.....	7
Radio Verda.....	7
NASK 2006 (S. Norvell Jr.).....	8
Kalendareroj 2007.....	8
Sukcesa novembra laborbrigado en Montreala Esperanto-Domo (B.-A. Legault).....	9

Literaturaĵo

Unu deziro (poem de D. kaj J. Perry, esperantigis M. Hopkins).....	9
--	---

Niaj membroj

Bill Peers forpasis (J. Kuhl).....	10
------------------------------------	----

Artikoloj

Lernu (paroli/skribi) Esperante pri Kanado per Vikipedio (P. Hopkins).....	11
Situacio de la indiĝenaj lingvoj en Kanado kaj ebla rolo por la kanada Esperanto-movado (J. Alain).....	15
De l' redaktoro.....	18

Anoncoj

Montreale invitas.....	19
En Montreale oni aktivegas.....	19
Novaj varoj ĉe la Libroservo de KEA.....	20

Eldonkvanto de ĉi tiu numero : 200

Redaktis : Paul Hopkins

Provlegis : Ken Price, Allan Simon, Bob Williamson

Presis kaj distribuis : Wallace George du Temple

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn taksojn, opiniojn, kaj kritikojn, kio ebligas plibonigon de la revuo. *Lumon* senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiuj KEA havas interkonsenton pri interŝanĝo de revuoj.

SE VI ANKORAŬ NE REALIĜIS AL KEA POR 2007, BV. FARI TION NUN!

Por (re)aliĝi al Kanada Esperanto-Asocio, sendu ĉekon por \$20 al

Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159

Sidney (BC) V8L 3S6

Dudek Jaroj de *Inter Ni*

(el *Inter Ni*, n-ro 241, majo 2006)



[El ĉiuj bultenoj de la kanada esperantistaro, *Inter Ni* sendube aperis plej multnumere (kaj plej regule): ĉiumonate dum 20 jaroj! Oni komence celis aperigi nur bultenon en kiu klubanoj povu ekzercisian uzadon de nia lingvo, sed intertempe ĝi tiel kreskis laŭ kvalito

kaj legantaro ke ĝi vere estas internacia periodaĵo. Kiu interesiĝas aboni ĉi tiun mirindan bultenon (abono kostas nur \$8 jare en Kanado), tiu trovos ekzemplajn numerojn ĉe la interreta adreso < http://www.esperanto.qc.ca/inter_ni/ > (psh)]

En sia libro *...Kun siaspeca spico!* (1971), **Raymond Schwartz** skribis ironie pri la Esperanta gazetaro, “Ĝi estas pli saĝa. Kvankam... Nu, kial plue tion kaŝi? La Esperanta gazetaro suferas pro stranga epidemio: Akuta datrevenito (lat. *anniversaritis acuta*) ... Kion fari kontraŭ tiu plago? Datreveno ne estas kiel ratdeveno. Pri ambaŭ oni ja konas la originan kaŭzon, sed oni povas malhelpi la konsekvencojn nur ĉe la dua. Helpe de ratveneno.”

Ni ne maltrankviliĝu pri tio. Je majo 1986, sub la gvidado kaj redaktado de **Harry Lewis**, la loka grupeto en Halifakso (Nov-Skotio) eldonis la unuan numeron de 3-paĝa gazeteto, kiun ni nomis *Inter Ni*. Laŭ la koncepto de Harry, la gazeteto provizu oportunon por grupanoj por praktiki skribadon, verkadon pri iu ajn temo en la internacia lingvo. Post kelkaj jaroj, mi transprenis la rolon de redaktoro, kaj **Gene Keyes** anstataŭis min dum jaro kaj duono. La celoj iom ŝanĝiĝis tra la jaroj, kaj nun ni ne tiom multe traktas lecionojn pri gramatiko, sed multe pli celas informi kaj distri la legantaron. Kun la pasinta, 240-a numero, *Inter Ni* finis 20 jarojn de ĉiu-monata apero, kaj ĉiumonate ni rajtas festi la veran 20-jariĝon de nia modesta gazeteto.

Kial festi? Unue ni festu la daŭran ekziston de la gazeto. Jam estis jarfinoj, kiam mi dubis, ĉu nia gazeteto daŭrus. Kiel ni jam scias, estas aliaj revuoj

(ekz. *Verda Teo* el Japanio), kiujn jaron post jaro aperigas lokaj grupanoj. Eble la nia indikas stagnan grupeton en kiu malmulto ŝanĝiĝas, sed mi preferas festi pliboniĝon en la kvalito de la artikoloj kaj, samtempe, pliboniĝon de la lingva scipovo de niaj kunlaborantoj kaj kunlegantoj.

Ni ankaŭ festu la daŭran partoprenon de niaj abonantoj kaj legantoj. Oni povas nur supozi ke la legantoj ankaŭ kutime ŝatas la enhavon. Jam ekzistas en la interreto tro multe da materialo esperantlingva kaj interesoplena por povi ĉion legi kaj aŭdi kaj spekti. Mi supozas, ke la ricevo de ĉiumonata surpapera gazeteto kun belaj grafikaĵoj kutime plaĉas al la legantoj. Oni povas trankvile porti kaj legi ĝin kie ajn oni deziras.

Ni festu ankaŭ pro tio, ke nia eta grupo de kunlaborantoj kreas firman ligilon al pli-grandiĝanta grupo de homoj ĉirkaŭ la mondo. **Steĉjo Norvell** disdonas multajn ekzemplerojn al sia konatularo, kaj instigas al ili verki kontribuaĵojn. Tial la grupo "inter ni" troviĝas en eĉ pli diversaj foraj anguloj de la mondo, kaj ni povas ankaŭ dividi pli riĉan fonton da informo pri nia pli-grandiĝanta komunumo. Eĉ se la aperritmo iom stumblas de tempo al tempo, la enhavo – se mi rajtas tion diri – kutime estas intereso-plena.

— Bob Williamson



Loĝlokoj de Legintoj kaj Legantoj de *Inter Ni*

Aŭstralio	Kubo
Aŭstrio	Mongolio
Brazilo	Nederlando
Britio	Nepalo
Bulgario	Niĝerlando
Ĉeĥio	Pollando
Danlando	Rumanio
Francio	Rusio
Germanio	Slovakio
Hungario	Slovenio
Japanio	Slovakio
Kanado	Togolando
Koreio	Usono
Kroatio	

[Pri la fama **Mez-Kanada Renkontiĝo (MeKaRo)** okazinta en Otavo – ĉe la “landlimo” inter Kebekio kaj Ontario – dum majo de 2006 vi povas ĉi-sube legi du raportojn, unu el kebekia vidpunkto, kaj alian el ontaria. – psh]

Kvara MeKaRo

(el *La Riverego*, n-ro 84, junio 2006)

En la longa semajnfino de majo, ekestis tradicio inter Otavo, Montrealo kaj Toronto organizi MeKaRon. Esperantistoj el Kebekio, el Ontario kaj eĉ el Usono partoprenis ĝin en agrabla kaj amikeca etoso. Ĉi-jare la vico estis al Otavo.

Mia koramiko **Marc-Philippe** kaj mi foriris aŭte el Montrealo sabaton matene, por alveni iom malfrue al la decidita renkontopunkto, apud la kanada parlamentejo. Tie ni vidis dekon da esperantistoj tuj forirontaj por viziti la ĉirkaŭaĵojn. Komencis pluveti, kaj mi estis forgesinta mian pluvombreton en la hotelĉambro! **Ian** de Otavo ĉiĉeronis por gvidi nin apud la parlamentejo kaj la kluzoj de la Rideau-kanalo. Jen alvenis pluraj aliaj esperantistoj el Montrealo! Eĉ la Bostonanoj alvenis.



Dum la MeKaRo...

fotis : Marc-Philippe Vincent

Dum ni marŝis, forĝisto alvokis nin; ni ĉirkaŭis lin kaj lian forĝotablon. Li tiam klarigis al ni (angle) el kio konsistas la metio de forĝisto, kun bona humuro. Li montris al ni bazajn trukojn, kaj kontraŭ unu dolaro Marc-Philippe akiris belan Shokon. Poste ni vizitis la muzeeton de Bytown, pri historio de Otavo. Ni lernis pri la konstruo de la kanalo, pri la vivo tiam kaj pri la murdo de Thomas D’Arcy-McGee.

Je la dektria estis tempo iri al la itala restoracio Carmello’s, ĉe angulo de Cartier kaj Cooper. Aliaj esperantistoj el Otavo atendis nin tie. Post pli ol unu horo da atendo je malsato, alvenis tre bongusta manĝo! Mi manĝis kvadratan spican picon. Babilante pri io ajn, agrablis la etoso. Post la tagmanĝo, estis tempo promeni ĉe la Otava universitato. Kelkaj marŝis tien, aliaj tien veturis. **Bruce Crisp** prezentis sinsekve la kvin prelegantojn. **Francisko Lorrain** ridigis nin per sia teatraĵo pri tio ke la bovinoj estas tiel perfekte pacemaj ke estas tute neeble ne preni ilin kiel ekzemplon por la tuta homaro! **Suzanne Caron-Richer** montris al ni anamorfozojn, pentraĵojn kiujn oni ne povas vidi bone sen meti sur ilin reflektigan cilindron; vere interese. La vespero alvenis! Ni vespermanĝis ĉe La Tablo, vegetarana restoracio ĉe okcidenta parto de Otavo, kiu estas la otava versio de Le Commensal. Ni bone manĝis kaj babilis ĝis la 21a, kaj foriris por iri dormi.

Dimanĉe, ni vizitis la Muzeon pri Civilizacioj, en Gatino, trans la rivero Otava. Ni unue brunĉis en la manĝejo de la muzeo, kiu estis iom malfacile trovebla, sed alveninte ni trovis jam alvenintajn esperantistojn. Mi manĝis patkukojn. Ni vizitis la ekspozicion pri Petra, antikva urbo de Jordanio. Tre interesa civilizacio. Poste, Marc-Philippe kaj mi vizitis la daŭrajn ekspoziciojn, pri la indianaj vivmanieroj kaj afrikaj artaĵoj. Posttagmeze, pluraj el ni volis

promeni, ĉar tiam la suno ekaperis! Gvidis nin **Jean Alain**, laŭ la rivero Otava kaj en la okcidenta parto de Gatino. Sufiĉe for de tradiciaj turistkaptejoj. Ni vagis tra parkoj, vidis ruinon de konstruaĵo, promenis en dormanta urbo. Vespere, ni ankoraŭfoje manĝis ĉe Carmello's, estis tiom bonguste! Babilis, bone manĝis...

Lundon matene, lasta aktivaĵo en la programo, brunĉo ĉe **Merle** kaj **Guy Matte**, en Orléans. Bela kaj granda domo. Manĝante, Merle kaj Guy Matte rakontis kiel ili renkontis unu la alian, en kurso de Esperanto! **Normando** kaj **Zdravka** faris same, en Esperanta kongreso. Ĉiam interese. Vere, formiĝas paroj pro Esperanto; tio mirigas min, ke simpla ideo kiel Esperanto povas tiom forte ligi homojn. Tio eble ne ŝajnas tia unuavide, sed konatiĝante kun Esperantistoj, mi trovis etan socion kies anoj estas ligitaj per komuna ideo, socion idealecan kiun mi ne trovus alimaniere. Poste, Guy montris al ni la « Esperantan ĉambron » kiu enhavas plurajn librojn, kaj eĉ la unuaj eldonoj de *Lumo* en 1900-aj jaroj. Mi ja sciis ke Esperanto estas centjara, sed jen la pruvo ke la ideo de Esperanto trapasas generaciojn.

Jen tempo foriri! Salutante ĉiujn, ni forveturas hejmen. Jen fino de bela semajnfino...

Al mi multe plaĉis la semajnfino. Entute ĝin partoprenis dudek-kvino da Esperantistoj. La kvara MeKaRo plene sukcesis laŭ mi. Ĝi estis okazo ekkoni kun tiuj kiujn ni ne konas, kaj revidi tiujn kiujn ni jam konas.

– Martin Benoit

Mez-Kanada Renkontiĝo

(el *La Torontano*, n-ro 76, printempo 2006)

MeKaRo 2006 okazis en Otavo de sabato la 20a ĝis lundo la 22a de majo. En iomete pluva vetero, sabate je la 10a matene, ĵus alvenintoj renkontiĝis kun **Ian Wheeler** ĉe la angulo de la stratoj Sparks kaj O'Connor. Ian gvidis nin preter la parlamentejo de Kanado, kaj sube al la kluzoj de la kanalo Rideau. Tie forĝisto tiel interese klarigis pri sia metio – fari ne nur ĉevalŝuojn, sed multajn utilajn feraĵojn el 'nigra metalo', ke ni restis dum duono de horo, foje movante iom por eviti la fumon de lia fajro. Ni lernis interalie, ke en la mezepoko fero nomiĝis 'la nigra metalo' (angle: 'the black metal'). Pro tio ke la forĝisto formis utilajn objektojn el ĝi per bategado de la varmegigita metalo, kaj angle 'bategi' estas 'smite', la angla nomo de la metiisto, 'black-metal smiter' fariĝis 'Blacksmith'.



Partoprenantoj de MeKaRo 2006 primiras la meti-arton de forĝisto en Otavo

Apude estis aktoro kostumita kiel la fama Kolonelo By, kiu estris la konstruadon de la fortikajoj en Otavo, kaj de la kanalo Rideau, konstruita kiel milita transportvojo. Kelkaj fotografiĝis kun li, kaj li rekomendis viziti la Muzeon Bytown en apuda konstruaĵo kiu estis uzita de la garnizono en la 1700-aj jaroj.

De la malnova muzeo ni rapidis al bona itala restoracio, Carmello's, kaj plimulto el ni sukcesis alveni tie antaŭ ol pluvo komencis fali denove, iom forte. Post malrapida manĝo kun multe da

babilado, ĉiuj iris al la arta konstruaĵo de la universitato, kie ni havis ĉambron je nia dispono dum la tuta posttagmezo. Kelkaj personoj distris kaj edukis nin per siaj prelegoj. Antaŭ ĉiu ero, **Bruce Crisp** (Otavo) prezentis la prelegonton, por ke aliurbanoj sciu ion pri tiu persono.

Yves Bellefeuille (Otavo) parolis pri la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando, kaj la oficejo de Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno, Belgio. En la CO laboras deko da homoj kiuj estas profesiaj esperantistoj, kaj en la oficejo de FEL laboras kvin profesiaj esperantistoj. En la CO oni ĉefe okupiĝas pri la revuo *Esperanto*, la *Jarlibro*, la Universala Kongreso, la libroservo de UEA kaj la UEA-kontoj. FEL ankaŭ havas libroservon kaj krome faras gravan eldonan laboron, i.a. por la revuo *Monato*. Ambaŭ oficejoj estas viziteblaj, sed oni petas ke vizitontoj antaŭ-anoncu sin.

Suzanne Caron-Richer (Otavo) klarigis pri la artformo 'ANAMORFOZO'. La pentraĵo sur plata surfaco ŝajnas esti abstrakta, kaj tute ne rekonebla kiel io konata. Se oni rigardas ĝin respegulita en cilindro kiu staras tuj malantaŭ ĝi, la spegulaĵo estas bela bildo, tuj rekonebla. Suzanne studis tion en la universitato, kaj montris ekzemplojn kiujn ŝi mem pentris.

Merle Haltrecht-Matte (Otavo) parolis pri Judaj Festotagoj, klarigante iliajn devenojn, kaj kiel oni festas ilin. **Erin Piatetski** (Bostono) montris sin multescia pri la temo, kiam Merlo faris demandojn al la aŭskultantoj.

François Lorrain (Montrealo) parolis tre humure kaj dramece, pri la konekto inter bovinoj kaj Esperanto. Surprizis min ke instruisto de matematiko tiel vive kaj dramece prezentis.

Jean Alain (Otavo) faris prelegon pri la temo "Situacio de la indiĝenaj lingvoj en Kanado kaj ĝia ebla rilato kun la kanada esperantisma movado". Temis pri panoramo de la situacio, kaj propono de ebla nova kampo de agado, informado kaj instruado de Esperanto fare de Kanadaj esperantistoj. Poste, Jean aŭdigis mallongajn eltiraĵojn el KDisko, instruanta la Krian lingvon. Laŭ sugesto de aŭskultantoj, la prelego estas reverkota de Jean, por ebla publikigo en *Lumo*. [Vidu paĝon __ de ĉi tiu numero – psh]

Kuna vespermanĝo okazis en restoracio "The Table" (1230 Wellington W., ĉe angulo de Holland). Ĝi estas vegetara, kaj oni prenas kion ajn oni volas, kaj pagas laŭ la pezo de la plena telero. Ni tiom multe babilis post la manĝo, ke fine ni decidis ne fari la planitan viziton al la lago Dow, parte pro minaco de plia pluvo.

Dimanĉe: Muzeo de Civilizacio - renkontiĝo en la restoracio. Poste vizito al ekspozicioj laŭvole. En la posttagmezo la pluvo ĉesis kaj la suno bele brilis. Jean Alain gvidis piedan promenon laŭ la bordo de la Otava rivero, kaj al historie interesaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo.

Lunde, tiuj kiuj ne jam devis iri hejmen por labori - lundo ne estis ferio en Usono - aŭ pro aliaj kialoj, estis invititaj al 'brunĉo' (kombinita maten-/tag-manĝo) en la domo de Merle kaj **Guy Matte**. **Clayton Smith**, kiu ne partoprenis en la aliaj tagoj, bonŝance kaptis la okazon veni kaj renkonti nin. Clayton, kiu estas pli bone konata al Torontanoj, kaj al junuloj ĉirkaŭ la mondo kiel 'Argilo', nun laboras en Otavo. Post la manĝo, Guy montris sian Esperantan Bibliotekon. En ĝi li havas ion el la plej frua historio de la Esperanto-movado en Kanado - tri numerojn de la gazeto *La Lumo*, eldonitaj en Montrealo en 1902 kaj 1903.

– Ken Price

100-jariĝo de Esperanto-klubo en Toronto

(el *La Torontano*, n-ro 77, aŭtuno 2006)



La jarlibro de UEA 1912 informas ke Esperanto-klubo estis fondita en Toronto en oktobro 1906. En 1912, laŭ tiu libro, la prezidanto de la klubo estis **Robert Sangster**, 272 Gerard Street E. La sekretario estis **Max A. Frind**, 133 Yorkville Avenue, kaj vicprezidanto estis F-ino **Kate Bell**, 60 Beach Avenue, Bealmy Beach. Kasisto estis F-ino **Bessie Bowling**, 17 Metcalfe Street. Max Frind ankaŭ estis prezidanto de La Ligo de Junularo Esperantista kaj s-ro Sangster estis ankaŭ la UEA delegito (tiam nomita 'konsulo'), kaj por tio lia adreso estis 55 Bathurst Street. Eble unu el tiuj adresoj estis lia

laborejo.

La jarlibro 1912 ankaŭ informas ke **Kanada Esperantista Asocio** fondiĝis la 1an de novembro 1907. Tio estis la unua tutlanda Esperanto-asocio en Kanado. Ĝi ĉesis funkcii dum la dua mondmilito, kaj estis refondita kun ĝia nuna nomo Kanada Esperanto-Asocio, en 1958.

Prezidanto de KEA en 1912 estis **A.P. Beauchemin** (Montreal), kaj s-ro Sangster estis ĝia ĝenerala sekretario. Ankaŭ ekzistis konsuloj en Belleville (ON), Carstairs (AB), Fill Hills (SK), Grand Mere (QC), London (ON), Montrealo (QC), Niagara Falls (ON), Otavo (ON), Saint-Hyacinthe (QC), Vankuvero (BC), Vankleek Hill (ON), Victoria (BC), Westholme (ON), kaj Vinipego (MB).

RADIO VERDA

(el *Inter Ni*, n-ro 237, januaro 2006)

Radio Verda estas pioniro en produktado de sendependa, internacia, plene interreta aŭdprogramaro en Esperanto. Vin unue salutis la voĉo de Esperantujo en 1998.

En Radio Verda vi aŭdos plej diversajn temojn kaj pensojn. RV celas aŭdigi interesajn, mallongajn kaj ofte ŝanĝiĝantajn programojn al esperantlingvaj retanoj de la tuta mondo. RV malformalas kaj rifuzas promesi specifan aperitmon. Oni kalkulas je viaj kontribuoj!

Venu por kunpioniri. RV esploras podkaston* teĥnologion per komuna ĝuado de ĉiaj pensoj kaj temoj el nia Verda komunumo.

Vizitu kun **Karlina** kaj **Arono** en Vankuvero (Kanado) ĉe < <http://radioverda.com> >.



Arono kaj Karlina, produktantoj de Radio Verda

*podkasti = brodkasti (radio-disendi) per son-dosiero akirita el la interreto. Oni povas aŭskulti la dosieron per persona aŭdilo kiam ajn oni deziras.

NASK 2006

(el *Inter Ni*, n-ro 243, julio 2006)

[Pasintan someron okazis lasta sesio de NASK en Vermonto, kaj Steĉjo Norvell, veterano de la studprogramo, ĉeestis: sekvas lia raporto. Se vi pripensas partopreni la sekvan sesion de NASK en 2007, kiun gastigos ĉi-foje la Universitato de Kalifornio ĉe Sandiego, nepre vizitu la NASK-retejon < <http://esperanto.org/nask/> > (psh)]



Partoprenantoj de NASK 2006 en Brattleboro (VT), julio 2006

La 37a ĉiujara Nord-Amerika SomerKursaro de Esperanto okazis en la Lernejo por Internacia Trejnado en Brattleboro en la ŝtato Vermonto (Usono) de la 3a ĝis la 21a de julio, 2006. Estis ses stabanoj kaj 23 studentoj en tri niveloj. Neniame, en mia propra sperto pri Esperanto-kursaroj en Sanfrancisko kaj Brattleboro, parolis tiom multe la studentoj en ĉiu nivelo. La instruistoj uzis multajn trukojn por paroligi la studentojn. En la klasĉambroj studentoj prelegis al la samklasanoj, demandis, klarigis, disputis, argumentis kaj korektis erarojn. Aldone, en la koridoroj, en la manĝosalono, en la vesperaj

programoj, kaj dum la semajnfinaj ekskursoj ili babilis, ŝercis, ridis, interkonatiĝis kun alilandanoj kaj serioze diskutis. Se oni mezuras la akiron de lingvokapablo laŭ unuoj de interparolado, certe la kursaro multe sukcesis.

La ĉefinstruisto estis **Lee Miller** el la ŝtato Missouri (Usono), kaj la aliaj du instruistoj estis **Katalin Kovats**, hungarino el Nederlando, kaj **Sylvain LeLarge**, franco el Nederlando. Kvar studentoj venis de Japanio, tri de Kanado, du de Belgio, kaj po unu de Nepalo kaj Kroatio. La aliaj venis de tre diversaj partoj de Usono.

Estas iom ironie, ke unu el la plej sukceso-plenaj kursoj en Brattleboro estos ankaŭ la lasta en tiu urbo. La venonta NASK de Esperanto estos en la somero de 2007 ĉe la Universitato de Kalifornio, en La Jolla, iomete norde de San Diego.



— Stevens T. Norvell

Kalendareroj 2007 (vidu ankaŭ p.19)

27-a ĝis 30-a de julio

55a Nacia Kongreso de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA), Tijuana, Meksikio. Informiĝu ĉe <http://esperanto-usa.org/node/667>. Deŝutu la kongresan bultenon en Esperanto de <http://esperanto-usa.org/kongreso2007/Unua-Bulteno-Eo.pdf>

21-a ĝis 23-a de septembro

Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK), Central Saanich (apud Victoria), Brita Kolumbio. Petu informojn kaj aliĝilon de esperanto@shaw.ca . Loĝejo kaj konferencejo estos *Quality Inn*, tel. 1-800-567-8466

Sukcesa novembra laborbrigado en Montreala Esperanto-Domo

(el retejo de MEMO: < <http://www.esperanto-montreal.org/eo/node/439> >)

La 11an de novembro (2006) kuniĝis ses laboremaj esperantistoj por antaŭenigi projektojn ĉe Montreala Esperanto-Domo.

Laborante dum kvin horoj, la kuraĝuloj sukcesis detale katalogi kvindek da libroj kiujn ESK intencas donaci al BAnQ (Nacia Biblioteko kaj Arĥivoj de Kebekio). La instiganto de tiu projekto estis Normand Fleury, prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia, kiu diris :



Kunlaborantoj ĉe laborbrigado en MEDO

"En urba biblioteko de Toronto estas pli ol 350 haveblaj titoloj pri aŭ en Esperanto. Dume, en tutkebekia nacia biblioteko troviĝas apenaŭ kvindeko da titoloj, kiuj rilatas al Esperanto. Okazigo de Tutamerika Kongreso de Esperanto en Montrealo en julio 2008 donas al ni plian kialon por pledi al BAnQ kaj al aliaj kebekiaj bibliotekoj (urbaj, universitataj, ktp) por pli da libroj pri kaj en Esperanto. Sed tio ne okazos per si mem. Ĝi postulos laboron niaflanke."

Alia plenumita projekto, gvidita de Martin Benoit, estis kontrolado de havebla kvanto kaj informo pri ĉiuj libroj de libroservo de KEA. Nun aĉetontoj de iu libro povas facile sciigi pri tio ĉu ĝi estas havebla en la libroservo pere de la retekatalogo de KEA: <http://www.esperanto.qc.ca/katalogo/> . Krome, tiu laboro ebligas al la responsuloj de la libroservo multe pli efike pritrakti ĝin.

Pluraj aliaj projektoj bedaŭre ne estis plenumitaj pro manko da homfortoj. La sekvonta laborbrigada tago okazos iam komence de jaro 2007. Ni esperas ke pliaj personoj ŝatus partopreni aŭ eĉ pli bone organizi la sekvan laborbrigadan tagon.

— Boris-Antoine Legault

Unu Deziro

Kanto de Dave kaj Jean Perry,
esperantigis Maria Hopkins

Se mi havus unu deziron por vi,
Se al mi estus nur unu donac',
Eĉ se mi havus la kanton perfektan por vi
Estus pri pac', paco por ĉiuj.

Ofte la homoj de l' mondo ne rimarkas
La esperon, kiun donas nova tag',
Kaj ofte, ĝi estas tie, videbla por ni,
Kiel kanto, aŭ blanka kolomb'.

Se mi havus unu esperon por vi,
Se al mi estus nur unu ben',
Eĉ se mi povus elsendi mesaĝon ununuran,
Estus pri pac', paco por ĉiuj.

Se mi havus unu deziron por vi
Se al mi estus nur unu donac'
Eĉ se mi havus kanton perfektan por vi
Estus pri pac', paco por ĉiuj,
Estus pri pac', paco por ĉiuj.

Bill Peers

Hieraŭ (17.jul.2006) mi ricevis mesaĝon, ke Bill Peers, mia ununura, plej bona, longjara amiko, mortis pro apopleksio en Anglio. Li vojaĝis al Anglio por partopreni la lastan el la ĉiujaraj reunuiĝoj de liaj skadranoj, kun kiuj li servis en la R.A.F. (Royal Air Force), dum la dua mondmilito. Perdiĝis al la homaro modela homo de kiuj ne multaj ekzistas. Bill naskiĝis en Skotlando, kaj kiam li havis kvin jarojn, lia familio enmigris Britan Kolumbion en Kanado. Kvankam li servis en la Aerarmeo kaj ricevis multajn medalojn, li tute ne fieris, sed eĉ hontis pro sia aktivado, en kiu li sin mem kunkulpis mortigi senkulpajn virojn, virinojn kaj infanojn dum li servis en la Aerarmeo.

Post kiam li revenis al Kanado, Bill vizitis la Universitaton de Brita Kolumbio por studi. Li fariĝis instruisto pri Angla Literaturo, Matematiko kaj Industria Artoj (manipulado de man-ilaro). Dum liaj studentaj jaroj li vizitis socialismajn prelegojn kun Harri Rankin, iama kunstudento kiu poste fariĝis advokato kaj pli poste urba konsilanto en Vankuvero.

Kiel juninstruisto Bill komencis instrui en vilaĝoj de la indiĝenaj popoloj, kie la indiĝenoj ne nur respektis lian bonan instruadon sed akceptis lin kiel fraton, samgentanon.

Poste Bill aniĝis en la Veteranoj Kontraŭ Nukleaj Armiloj (VANA). En la 60-aj jaroj li sola iris al la landlimo de Kanado/Usono, kie li haltigis trafikon por disdoni flugfoliojn por protesti la nukle-bombajn elprovojn, eksperimentojn. Li estis adorata de siaj lernantoj en mezlernejo en Abbotsford, kiuj sen lia antaŭa scio, subite aperis ankaŭ ĉe la landlimo por helpi lin distribui la flugfoliojn. Pro tio la lernejestro intencis eksigi lin el la mez-lernejo, sed pro la protestoj de la lernantoj kontraŭ la eksigo de Bill la lernejestro retiris sian decidon.

Bill mem vivis tre simplan vivon kaj fordonacis sian monon al multaj ekologioprotektaj organizaĵoj, kiel Verda Paco (Greenpeace) kaj ankaŭ al UNICEF li donacadis. Li mem ne generis rubon por venenigi la medion per plenigo de rubaĵmontoj. Li mem forbruligis ĉion brulendan; restaĵojn de legomoj (malsekan rubon) li reuzis kiel grundmiksaĵon en sia ĝardeno, kaj reuzeblan materion kiel ladskatolojn, ĉiuspecajn metalojn, ktp. li veturigis al la koncernaj "Reciklo-Kolektejoj". Li ne ŝprucis venenaĵojn sur la frukt- aŭ nuksarbojn, sed permane li mortigis la aperantajn raŭpojn sur folioj kaj ŝmiris kalkon kaj similajn ŝmiraĵojn sur la trunkojn por malebligi al rampantaj insektoj surrampi la arbojn.

En la sesdekaj jaroj Bill kontaktis min post legado de mia anonco en *Match* (usona periodaĵo anarkiista) pri Esperanto kaj komenciĝis vere bona amikeco inter ni. Li vizitis min ĉiun semajnon por ekzerci sin kun ni en la uzo de Esperanto. Poste ni aliĝis al la Esperanto-Klubo en Vankuvero, veturis al Seatlo por starigi kontakton kun la esperantistoj de Seatlo. Ni renkontiĝis kun James Parks, Raol, kiu estis rifuĝinto el Kubo, du aliaj personoj, kies nomojn mi forgesis, kaj kun Liland Ros. Ni parto-prenis la Esperanto-kongreson en Kalgario, kelkajn NOREK-kongresojn kaj multajn manifestaciojn kontraŭ la malvarma milito tiutempa.

Lia kara edzino, Gwen, jam mortis antaŭ kelkaj jaroj post terura malsaniĝo pro kancero. Ili ambaŭ estis membroj de la Unitaria Eklezio (unitarianoj). Li postlasas du filojn kaj unu filinon kaj sep genepojn. Bill havis okdek kvin (85) jarojn.

— Jurgen P. Kuhl

Ni kun bedaŭro informas ke dimanĉon, la 21an de januaro 2007, mortis en Toronto, pro pneŭmonio, **W.D.B. (Dez) Hackett**, honora membro de **Kanada Esperanto-Asocio**. Li estis 88-jara. Dum kelkaj jaroj sekretario de la Esperanto-klubo de Toronto, en 1958 li iniciatis la refondon de la Kanada Esperanto-Asocio, kiu estis malaperinta en 1941 pro la dua mondmilito. Li servis kiel la unua sekretario de KEA, poste kiel ĝia vic-prezidanto.

Plena nekrologo aperos en la sekva numero de Lumo.

Lernu (paroli/skribi) Esperante pri Kanado per Vikipedio!

Jam antaŭ ol li publikigis sian Unuan Libron, Ludoviko Zamenhof sciis ke por ke Esperanto disvastiĝu, ĝi devos esti uzebla en multaj situacioj. Li do rafinis la lingvon tradukante en ĝin multajn tre diversajn tekstojn. Dum la jaroj pasintaj depost la eldonado de la *Unua Libro*, miloj da esperantistoj kreis centmilojn da tekstoj uzante milionojn da vortoj Esperantaj: pri abakoj, amo kaj amoro ĝis zodiako, zoologio kaj zorgoj. Ni havas ampleksajn gramatikojn kaj dikajn vortarojn, sed ... pro manko de Esperant-lingvaj lernejoj kaj pro diseco de nia komunumo, la meza esperantisto ne povas eĉ priskribi sian ĉiutagan realon. Ĉu ne kredas vi? Provu detale priskribi vian ĉirkaŭaĵon Esperante: nomu la plantojn en via ĝardeno, la birdojn kiuj kantas apud via fenestro, la distrikton en kiu vi loĝas, la politikajn strukturojn municipajn, provincajn kaj federaciajn kiuj tuŝas vian vivon. Imagu ke vi sidas en rondo de amikoj kaj provu klarigi precize – sed tute en Esperanto – kie vi estis kaj kion vi vidis dum la pasinta ferio. Se mankas al anglalingvano aŭ franclingvano la nomo por besto, loko aŭ instanco, aŭ se li ne scipovas priskribi ion tian, li simple turnas sin al ĝenerala enciklopedio. Malgrandeco kaj diseco de nia lingvokomunumo tamen longe malhelpis la eldonadon de ĝenerala enciklopedio en Esperanto.

Dank' al laborego de multaj volontuloj ĝenerala enciklopedio en Esperanto tamen nun estiĝas en interreto: la Esperanta Vikipedio (enirpaĝo trovebla ĉe <<http://eo.wikipedia.org/wiki/Cxefpagxo>>). La Vikipedio estas retego de enciklopediaj artikoloj kreitaj kaj daŭre plibonigataj de ĝiaj uzantoj. Unue kreita en angla lingvo, ĝi nun havas versiojn en 250 lingvoj (55 kun pli ol dekmil artikoloj), de kiu la Esperanta estas la dekkvina laŭ la nombro de artikoloj (66 237 kiam mi skribas ĉi tiujn vortojn). Kompreneble, ne ĉiuj artikoloj estas samvaloraj: artikoloj ekestas nur dank' al la laboro de volontuloj, kaj ili korektiĝas kaj pliboniĝas nur kiam legantoj rimarkas erarojn aŭ mankojn kaj ilin forigas per sia propra laboro.

Kiam mi “malkovris” la vikipedion en marto de 2006, jam estis en ĝi iuj artikoloj priskribantaj la landon en kiu mi vivas, Kanado, kaj ties historion, socion, loĝantojn, instancojn, klimaton, bestaron, birdaron ktp, sed ne multaj. Sub la vikipedia nomo **Kanadano** mi do eklaboris: mi legis multajn artikolojn, atente notis iliajn stilon kaj strukturon, kaj iom post iom komencis plibonigi artikolojn kaj krei novajn. Mi ne limigis mian atenton al temoj tuŝantaj Kanadon – precipe dum la pasintaj kvar monatoj mi multe okupiĝis pri sistema kompletigo el taksonomia vidpunkto de artikoloj pri vivuloj ĉiuspecaj – sed Kanado daŭre restis kaj restas grava ligpunkto por miaj esploroj. Mi invitas legantojn de *Lumo* ĝui la fruktojn de miaj laboroj kaj ilin utiligi kiam ili deziras Esperante priparoli/priskribi ion kio koncernas nian landon: eble tio eĉ kuraĝigos ilin ja paroli/skribi pri kanadaj temoj uzante nian karan lingvon... ekzemple por *Lumo*.

Sube trovu liston de vikipediaj artikoloj kiuj rekte rilatas Kanadon: certe ĝi ne estas kompleta – en la vikipedio estas artikoloj pri birdoj, ekzemple, foje troveblaj en Kanado sed ne listigitaj ĉar la artikolo ne mencias vivlokon, kaj tie certe estas multaj artikoloj pri plantoj kaj bestoj alportitaj al Kanado far eŭropaj kaj aziaj enmigrantoj. Konsideru ĝin unua provo. Mi aldonas indikon pri tio, kiujn el ĉi tiuj artikoloj mi mem kreis aŭ plibonigis... por ke vi sciu kiu (almenaŭ parte) respondecas pri ilia nuna formo.

— Paul Hopkins

Vikipediaj artikoloj de *Kanadano* rilatantaj al Kanado

* = *Kanadano* kreis unuan version
+ = *Kanadano* plibonigis la artikolon
() = kategorio donita por orientiĝo

0. Ĝenerale

Kanado +
Nomiĝo de Kanado

1. Esperanto-Movado

1.1 Asocioj/instancoj/eventoj

Esperanto-Antaŭen +

Esperanto-societo kebekia +
Kalgaria Esperanto-Centro +
Kanada Esperanto-Asocio +
Kanada Esperanto-movado +
Libraro Ludovika *
Nord-Amerika Junulara Tendumado+
UK 1984

2. Antropologio

Akadianoj
Indianoj +
Inuitoj
Krioj
Metisoj

Mikmakoj
Otavoj

3. Biografio

3.1. Esperantistoj

Listo de kanadaj esperantistoj +
Henrik Bauermeister +
A. P. Beauchemin +
Yves Bellefeuille +
Edmund (Kajmo) Brent *
Pierre Collinge +
François de Kinder +
Olga du Temple *

Wallace George du Temple *
 Rüdiger Eichholz +
 Vilma Sindona Eichholz
 Mark Fettes
 Harry Fineman +
 Normand Fleury +
 Higinio García +
 Geoffrey Greatrex *
 W. Desmond Hackett *
 Merle Haltrecht-Matte *
 Dorothy M. Hawley +
 Paul Hopkins *
 Jerzy W. Jarmasz +
 David W. M. Jenkins *
 Brian D. Kaneen *
 Sonja Elen Kisa
 Yan Levasseur +
 Harry J. Lewis +
 Alice Maier +
 Guy Matte *
 John R. A. Mayer *
 Matthew McLaughlin +
 Zdravka Metz *
 Stevens T. Norvell *
 Vadim' Victor Obrastsoff
 Ron Ogram
 Lorcán ÓhUiginn *
 Kenneth Price *
 Maurice Provost +
 Joëlle Rabu *
 Ian McKenzie Richmond *
 U. Paul Ronald *
 Betty Salt +
 Allan K. Simon *
 Krišs Smilga +
 F. X. Solis +
 Robert J. Williamson +
 Edward William Woodruff

3.2. Famaj kanadanoj

Pamela Anderson
 William Baffin
 Jean Benoît
 Éphrem-A Brisebois *
 Étienne Brûlé +
 Kim Campbell *
 Jacques Cartier
 Jean Chrétien *
 Joe Clark *
 Céline Dion
 Atom Egoyan
 James Evans
 Lara Fabian
 Mylène Farmer
 Darren Flutie
 Michael J. Fox +
 Terry Fox

Stephen Harper *
 John Howe +
 Kenneth E. Iverson +
 Michaëlle Jean +
 Ralph Klein *
 James Macleod *
 Paul Martin *
 Brian Mulroney *
 Simon Newcomb
 Mimi Parent
 Keanu Reeves
 Louis Riel +
 Robert J. Sawyer +
 William Shatner +
 Natasha St-Pier
 Donald Sutherland +
 David Thompson (esploristo) *
 Pierre Trudeau +
 John Turner *
 Alfred Elton van Vogt
 Rudolf Vrba +

4. Biologio

4.1 Fiŝoj

Aktinopterigo +
 (ezokedoj)
 Ezoko
 Salmonedoj *
 Salmo *
 Truto *

Sarkopterigo +
 Tiktaliko +

4.2 Reptilioj

4.2.1 Formortintaj

Dinosaŭro
 Ceratopoj *
 Edmontonio *
 Ĥampsosaŭro *
 Tiranosaŭredoj *
 Gorgosaŭro *
 Tiranosaŭro *

Flugsaaŭroj *
 Kecalkoatlo (flugsaaŭro) *

4.3 Birdoj

(akcipitredoj)
 Blankkapa maraglo +
 Reĝa aglo
 Anasedoj +
 Anaso +
 Kreko +
 Molanaso +
 Pintvostanaso +
 Platbeka anaso +
 Ansero +
 Kanada ansero +

Neĝansero +
 Aŭkedoj +
 Atlantika fraterkulo +
 Granda aŭko +
 Korna fraterkulo +
 Tufa fraterkulo +
 Bombicilo +
 Amerika bombicilo +
 Falkoformaj +
 Falkedoj +
 Falko +
 Amerika turfalko +
 Ĉasfalko +
 Kolombfalko +
 Migra falko +

Gaviedoj +

Arkta kolimbo +
 Blankbeka kolimbo +
 Granda kolimbo +
 Ruĝgorĝa kolimbo +

Gruedoj/Gruo +

Amerika gruo +
 Kanada gruo +

Korvedoj +

Garolo +
 Korako +
 Korvo +
 Pigo +

(pandionedoj)

Fiŝaglo +

Strigedoj +

Nikteo +
 Orelstrigo +

(tetraonedoj)

Lagopo
 Mutuso

4.4 Mamuloj

Cetacoj +
 Belugo +
 Griza baleno +
 Narvalo +
 Granda orcino +

(felisedoj)

Linko +
 Kanada linko *

Pumo +

Fokuloj +
 Ordinara foko +
 Marleono +
 Rosmaro +

Kanisedoj +

Kaniso *
 Kojoto *
 Lupo +
 Arkta vulpo +
 Vulpo +

Ruĝa vulpo *
 (mefitedoj)
 Mefito +
 Musteledoj +
 Gulo +
 Lutro +
 Kanada lutro *
 Mustelo +
 Taksideo +
 Vizono +
 Zibelo +
 Parhufuloj +
 Remaĉuloj +
 Antilokapredoj +
 Antilokapro *
 Bovedoj +
 Bovenoj +
 Bizono +
 Amerika bizono *
 Preria bizono *
 Kanada ŝafo *
 Kaprenoj +
 Oreamno *
 Ovio *
 Kanada ŝafo *
 Cervedoj +
 Alko +
 Blank-vosta cervo +
 Boaco +
 Cervo +
 Kanada cervo +
 Procionedoj +
 Lav-urso +
 Ronĝuloj +
 Histriko +
 Kastoro +
 Marmoto +
 Ondatro +
 Sciuro +
 (ursedoj)
 Urso +
 Amerika nigra urso *
 Blanka urso +
 Bruna urso +
 Griza urso *

4.5 Plantoj +
 (asteracoj)
 Rudbekio *
 (betulacoj)
 Alno
 Betulo
 (cipresacoj)
 Tujo
 (ekvizetacoj)
 Ekvizeto +
 (hidrokaridacoj)

Kanada akvopesto
 (kaktacoj)
 Pediokakto *
 (kverkoj)
 Kverko +
 Pinacoj +
 Abio
 Cugo
 Duglasa abio +
 Lariko
 (rozacoj)
 Okpetalulo
 (salikacoj)
 Nigra popolo *
 Tremolo +
 (sapindacoj)
 Acero +
 Arĝenta acero +
 Manitoba acero +
 Sukeracero +
 (taksacoj)
 Taksuso

5. Geografio
5.1 Homa
5.1.1 Provincoj/Teritorioj kun subprovincaj unuoj
 Provincoj k Teritorioj de Kanado +
 Alberto +
Listo de Municipaj Distriktoj de Alberto *
 Distrikto 16 Wheatland (Alberto)*
 Distrikto 17 Mountain View (Alberto) *
 Municipa Distrikto 31 Foothills (Alberto) *
 Municipa Distrikto 44 Rocky View (Alberto) *
 Jasper (Alberto) *
 Kananaskis (Alberto) *
 Censodistrikto 1 (Alberto) *
 Censodistrikto 2 (Alberto) *
 Censodistrikto 3 (Alberto) *
 Censodistrikto 4 (Alberto) *
 Censodistrikto 5 (Alberto) *
 Censodistrikto 6 (Alberto) *
 Censodistrikto 7 (Alberto) *
 Censodistrikto 8 (Alberto) *
 Brita Kolumbio +
 Vankuvera Insulo +
 Insulo de Princo Eduardo +
 Kebekio +
 Antikostio +
 Lanodierio +
 Magdalen-Insuloj
 Malsupra Sankt-Laŭrenco +

Petit Saguenay
 Saganio - Sankt-Johan-Lagio +
 Manitobo +
 Nov-Brunsviko +
 Novlando kaj Labradoro +
 Nov-Skotio +
 Insulo de Breton-Kabo +
 Ontario +
 Saskaĉevano +
 Jukonteritorio +
 Nordokcidentaj Teritorioj +
 Nunavuto +

5.1.3 Komunumoj de Kanado

Listo de urboj de Kanado +
Listo de komunumoj de Alberto *
Urbetoj de Alberto *
 Airdrie (Alberto) *
 Banff (Alberto) *
 Brooks (Alberto) *
 Camrose (Alberto) *
 Canmore (Alberto) *
 Chestermere (Alberto) *
 Cochrane (Alberto) *
 Cold Lake (Alberto) *
 Drumheller (Alberto) *
 Edmontono (Alberto) +
 Grande Prairie (Alberto) *
 Kalgario (Alberto) +
Listo de Kalgariaj Kvartaloj *
 Beltline *
 Leduc (Alberto) *
 Lethbridge (Alberto) *
 Lloydminster (Alberto/Saskaĉevano) *
 Medicine Hat (Alberto) *
 Okotoks (Alberto) *
 Red Deer (Alberto) *
 Spruce Grove (Alberto) *
 St. Albert (Alberto) *
 Strathmore (Alberto) *
 Abbotsford (Brita Kolumbio) *
 Burnaby (Brita Kolumbio) *
 Chilliwack (Brita Kolumbio) *
 Coquitlam (Brita Kolumbio)
 Courtenay (Brita Kolumbio) *
 Delta (Brita Kolumbio) *
 Kamloops (Brita Kolumbio) *
 Kelowna (Brita Kolumbio) *
 Langley (Brita Kolumbio)(urbo) *
 Langley (Brita Kolumbio)(distrikto) *
 Nanaimo (Brita Kolumbio) *
 Nov-Vestminstero (Brita Kolumbio) *
 Port Coquitlam (Brita Kolumbio) *
 Prince George (Brita Kolumbio) *
 Richmond (Brita Kolumbio) *
 Saanich (Brita Kolumbio) *
 Sidney (Brita Kolumbio) +

Surrey (Brita Kolumbio) *
 Vankuvero (Brita Kolumbio) +
 Vernon (Brita Kolumbio) *
 Viktorio (Brita Kolumbio) *
 Aglomeraĵo Viktorio *
 Alma (Kebekio) *
 Kebeko (Kebekio) +
 Mascouche (Kebekio)
 Montrealo (Kebekio) +
 Rock Forest (Kebekio) *
 Saint-Fulgence (Kebekio)
 Sherbrooke (Kebekio) *
 Trois-Rivières (Kebekio) *
 Churchill (Manitobo) +
 Vinipego (Manitobo) *
 Monktono (Nov-Brunsviko) +
 Church Point (Nov-Skotio) *
 Halifakso (Nov-Skotio) +
 Bramptono (Ontario) *
 Cobourg (Ontario) *
 Cornwall (Ontario) *
 Hamiltono (Ontario) *
 Kiĉenero (Ontario) *
 Kingston (Ontario) *
 Londono (Ontario) *
 Markhamo (Ontario) *
 Misisogo (Ontario) *
 Niagara Falls (Ontario) *
 Niagara-on-the-Lake (Ontario) *
 Oakville (Ontario) *
 Otavo (Ontario) +
 Peterborough (Ontario) +
 Queenstown (Ontario) *
 Sankta Katarino (Ontario) *
 Toronto (Ontario) +
 Vaughan (Ontario) *
 Windsor (Ontario) *
 Esterhazy (Saskaĉevano) +
 Estevan (Saskaĉevano) *
 Moose Jaw (Saskaĉevano) *
 North Battleford (Saskaĉevano) *
 Prince Albert (Saskaĉevano) *
 Reĝino (Saskaĉevano) *
 Saskatuno (Saskaĉevano) *
 Swift Current (Saskaĉevano) *
 Yorkton (Saskaĉevano) *

5.2 Natura geografio

5.2.0 Ĝenerale

Arkto

5.2.1 Akvejoj

Bafina Golfo +
 Bow (rivero) *
 Churchill (rivero - Atlantiko) +
 Churchill (rivero -Hudsona golfo) +
 Akvofaloj Elbow *

Elbow (rivero) *
 Eria Lago +
 Georgia Markolo *
 Akvorezervujo Glenmore *
 Golfo Sankt-Laŭrenco
 Grandaj Lagoj +
 Granda Slavia Lago *
 Granda Ursa Lago *
 Hudsona Golfo +
 Kanalo Rideau
 Kolumbio (rivero) +
 Niagara Akvofalo +
 Niagararo +
 Oldman (rivero) *
 Ontaria Lago +
 Red Deer (rivero) *
 Markolo de Reĝino Charlotte *
 Sankt-Laŭrenco (rivero) +

5.2.2 Insuloj

Bafina Insulo *
 Golf-Insularo *
 Insulo Gabriola *
 Insulo Galiano *
 Insulo Kuper *
 Insulo Mayne *
 Insulo Pender *
 Insulo Saltspring *
 Insulo Saturna*
 Insulo Thetis *

5.2.3 Parkoj

Parkoj de la Kanada Rok-Montaro*
 Naciaj Parkoj de Kanado *
Listo de naciaj parkoj de Kanado *
 Nacia Parko Aulavik *
 Nacia Parko Banff *
 Nacia Parko de Insulo Elk *
 Nacia Parko de la Arbara Bizono *
 Nacia Parko de Lagoj Waterton *
 Nacia Parko de Monto Revelstoke*
 Nacia Parko Glaĉera (Kanado) *
 Nacia Parko Jasper *
 Nacia Parko Kootenay *
 Nacia Parko Yoho *
 Nacia Park-Rezervejo de la Golf-
 Insuloj *
Listo de provincaj parkoj de Alberto*
 Dinosaura Provinca Parko *
 Provinca Parko Fish Creek *

6. Geologio

Laŭrenca tabulo *

7. Historio

Kompanio de Nova Francio
 Nova Francio

8. Infrastrukturo

C-Trajno *
 Korporacio de Transporto de
 Montrealo
 Metroo de Montrealo
 Provinca ŝoseo 1 (Alberto) *
 Trans-Kanada Ŝoseo *

9. Institucioj/firmaoj

Advanis
 Advanis Field Research
 Nelvana
 Reĝa Kanada Rajda Polico
 Reĝa Muzeo de Paleontologio Tyrrell
 *
 Universitato de Kalgario *
 Universitato McGill +

10. Kulturo/vizitindaĵoj

.ca
 Bizon-Saltejo Head-Smashed-In *
 Fortikaĵo Calgary *
 God Save the Queen
 Kalgaria Stampedo *
 Kanada interuniversitata sporto
 Kanada piedpilko
 Kanada universitata piedpilko
 Ligo kanada de piedpilko
 O Canada
 Premiitoj de la Guberniestro ĝenerala
 1954
 Sankt-Johan-Baptist-Festo
 Sedno (diino)

11. Lingvistiko

Akadia franca lingvo
 Algonkina lingvaro
 Aniŝinabeka lingvo +
 atapaska lingvaro +
 Inua lingvo +
 inuka lingvo +
 Kria lingvo +
 Miĉifa lingvo +
 Mikmaka lingvo +
 Mohoka lingvo +
 Nigrapieda lingvo
 Proto-algonkina
 salia lingvaro +

12. Meteologio

Vento de Chinook *

13. Politiko

Censa Metropolo *
 Ĉefministro de Kanado +
 Guberniestro ĝenerala de Kanado
 Kanada Parlamento
 Kebekio - Politika situacio

Situacio de la indiĝenaj lingvoj en Kanado kaj ebla rolo por la kanada Esperanto-movado

[La jena artikolo baziĝas sur prelego prezentita la 20-an de majo (2006) kadre de la soci-kultura forumo, dum la kvara MeKaRo en la urbo Otavo (Ontario). – la aŭtoroj]

Panoramo de la indiĝenaj lingvoj en Kanado

La oficialaj recenzoj de la Kanada Buroo de Statistiko (Statistics Canada), okazantaj ĉiun kvinan jaron (la lasta datiĝas de majo 2006), liveras ĝeneralan informon pri la indiĝena (aŭtoktona, aborigena) popolamaso en Kanado kaj ties lingva situacio.

Koncerne la indiĝenan popolamason, oni ĝenerale distingas inter tri grupoj de personoj : la indianoj (« unua-naciuloj»), la metisoj (de miksita parenceco, indiĝena kaj ne-indiĝena), kaj la inuitoj (antaŭe «eskimoj»). La recenzo de 1996 rezultigis nombrojn de 554 000 indianoj, 210 000 metisoj kaj 41 000 inuitoj loĝantaj en Kanado (entute : 805 000 personoj).

Pri lingvaj aferoj, la recenzo indikis ke, transkanade kaj sume :

- ♦ se 26 % de la indiĝenoj deklaris sian indiĝenan lingvon kiel gepatran, tamen nur 15 % konsentis ke ili kutime uzas tiun ĉi. Tio donas proksimume 120 000 kutimajn parolantojn de indiĝenaj lingvoj – tre modesta nombro.
- ♦ 30 % de la indiĝenoj tamen deklaris sin kapablaj konversi en sia indiĝena lingvo, kio donus proksimume 240 000 konverskapablulojn – ankaŭ modesta nombro.

Konsiderindas ke estas parolataj almenaŭ 61 apartaj indiĝenaj lingvoj en Kanado, fontantaj el 11 lingvaj familioj. Inter familioj, la lingvoj ege distingiĝas inter si tiel, kiel la angla distingiĝas de la japana. Meze de sama familio, la lingvoj ankaŭ distingiĝas inter si, tamen kutime malpli ol, ekzemple, la portugala de la franca – ambaŭ latinidaj lingvoj. Fine, ĉar kelkaj unuopaj lingvoj estas parolataj de popoloj tre disvastigataj tra la lando, kelkaj el ili prezentas regionajn dialektojn : ekzemple, almenaŭ kvar dialektoj troviĝas ĉe la kria kaj kvar ĉe la inuka lingvo.

Tia alta grado de lingva diverseco ege surprizas nelingvistojn, kiam tiuj konsideras la ĝenerale akceptitan teorion, laŭ kiu la indiĝenaj popoloj de ambaŭ Amerikoj ĉiuj devenas de identa nordorientazia regiono. Tia diverseco ŝajne ankaŭ iom mirigas profesiajn lingvistojn, eĉ post la hodiaŭa agnosko ke tiu amasenmigro en Amerikon verŝajne okazis kadre de tri apartaj ondoj de migrado.

Pro tio eble pli taŭgus paroli pri la ekzisto de tri grandaj lingvaj « superfamilioj » tra ambaŭ Amerikoj, respondaj al la tri grandaj enmigradoperiodoj, sur kiuj oni alfiksu la dek unu antaŭmenciitajn en-kanadajn « subfamiliojn » kaj poste sur tiuj ĉi dek unu la 61 unuopajn lingvojn. Sed kiel ajn estu, decidu pri la afero la profesiaj lingvistoj : tiu ĉi artikolo temas ne pri lingvistiko sed pri esperantismo. Ĉiuokaze, tiuj plej interesitaj pri lingvoj kontentiĝu per konsultado de la jena tabelo, kiu resume prezentas la « dek unu indiĝenajn lingvajn familiojn en Kanado » kaj la proksimuman nombron de ties parolantoj, laŭ la censo de 1996. ¹

¹ MJ Norris, L Jantzen. *Aboriginal Languages in Canada, 1996 / Les langues autochtones du Canada, 1996*. Mapo produktita en 2002 de la Kanada Ministerio pri Indianaj Aferoj kaj Norda Evoluo, Otavo, 2002, adaptita de aŭtoro produktita en 1996. QS-7041-000-BB-A1, Kataloga numero R2-231/1996.

Lingvaj familioj (lingvoj)	209 000
Algonkena familio (en Kanado : Inua, Kria, Mikmaka, Nigrapieda, Oĵibva)	146 000
Inuka familio (Inuktituta)	28 000
Atapaska familio (20 lingvoj parolataj en Kanado – plej multparolataj estas : Ĉipevajana, Bivera, Hundripa, Kariera, Kaska, Monta, Slavia, kaj Urslaga)	20 000
Siua familio (Dakota / Lakota / Nakota)	4 000
Saliŝa familio (10 lingvoj parolataj en Kanado – plej multparolataj estas : Halkomelema, Lilueta, Ŝuŝvapa)	3 000
Tsimŝiana familio (Cimŝiana, Gitksana, Niŝga)	2 500
Vakaŝana familio (Hajsla, Hejlcuka, Kvakvala, Maka, Nitinata, Nutka, Ovikina)	1 500
Irokeza familio (en Kanado : Mohoka)	500
Hajda familio	200
Tlingita familio	150
Kutenea familio	100

Plej parolataj lingvoj

Kria	88 000
Inuktituta	28 000
Oĵibva	26 000
Inua	9 000
« Denea » ²	9 000

Evoluo de la situacio ĉe la indiĝenaj lingvoj

Laŭ la indiĝenoj mem, la situacio ĉe la indiĝenaj lingvoj estas tre minaca. En la jaro 2003 estis starigita speciala laborgrupo de indiĝenaj saĝuloj por konsili la Kanadan Ministerion pri Nacia Heredaĵo. La laborgrupo publikigis raporton en 2005, kiu alvokis nacian strategion kaj specifajn agadojn por revigligi la indiĝenajn lingvojn kaj kulturojn.³

La raporto distingas inter la parolataj lingvoj laŭ ĉies vikleco kaj verŝajna daŭropovo, enkalkulante, ekzemple, la procentaĵon de la komunumo, kiu majstras kaj kutime parolas sian propran lingvon, la mezan aĝon de la parolantoj kaj « la kvanton de intergeneracia transmisio ». Ĝi raportas, resume, ke :

- 12 % de la indiĝenoj parolas « ankaŭ florantan » lingvon
- 18 % parolas « stabilan » lingvon
- 28 % parolas « malfortiĝantan » lingvon
- 30 % parolas « malaperantan » lingvon

2 Ne klaras prezice pri kiu lingvo aŭ lingvoj temas : la radiko *dene* signifas « popolo » en ĉiuj atapaskaj lingvoj.

3 *Task Force on Aboriginal Languages and Cultures. Towards a New Beginning : A Foundational Report for a Strategy to Revitalize First Nation, Inuit and Métis Languages and Cultures.* Dept of Canadian Heritage. 2005. (*Groupe de travail sur les langues et cultures autochtones. Le début d'un temps nouveau : premier rapport en vue d'une stratégie de revitalisation des langues et cultures des premières nations, des inuits et des métis.* Min. du Patrimoine canadien, 2005.)

11 % parolas « kritike malsanan » (preskaŭ mortintan) lingvon

Ĉe ĉiu indiĝena lingvo la daŭra scio de la denaska lingvo estas aparte minacata ĉe familioj aŭ individuoj, kiuj vivas ekster la denaska komunumo, en urboj ekzemple, situacio kiu aplikiĝas ĉe preskaŭ 20 % de la indiĝenoj, laŭ la recenzoj. Tialoke, la proporcio de personoj kutime uzantaj sian denaskan lingvon kaj la kvanto de intergeneracia transmisio estas ankoraŭ malpli grandaj ol tiuj konstatablaj en la originaj komunumoj.

La recenzo de 2001 ĝenerale indikas daŭre malpli bonan evoluon de tiu lingva situacio kompare kun tiu de la jaro 1996, kaj aparte malpli bona evoluo en la urbaj centroj. La urboj montriĝas granda kunfandiĝejo kaj terure efika malaperigilo por la indiĝenaj kulturoj.

Jam en 1996, la Reĝa Komisiono pri la Indiĝenaj Popoloj pritraktis la situacion de la indiĝenaj lingvoj en Kanado, en la tria volumo de ĝia raporto, petante efikan agadon por revigligi tiujn lingvojn, kadre de pli granda revigligo de la indiĝenaj kulturoj. La laborgrupa raporto de 2005 daŭrigas tiun zorgemon, sugestanta specifajn aldonajn rimedojn, pri kies plia kaj detala traktado bedaŭrinde ne temas tiu ĉi artikolo.

Rolo por la Kanada Esperanto-movado ? Por KEA ?

Unuavide, facilas fantaziumi pri ebla rolo de la Kanada Esperanto-movado por subteni tiujn endanĝerigitajn indiĝenajn lingvojn kaj kulturojn. Sed surbaze de jam famaj, idealismaj deklaroj kiaj ekzemple *La Manifesto de Prago*, ĉu la Esperanto-movado ne perfekte taŭgas por efika lingvoinstruado, por plurlingveco, por lingvaj rajtoj, entute por plena homa emancipiĝo?

Verdire, subteno al la Kanadaj indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj ja povus konsistigi indan, specife en-kanadan aplikon de la « interna idearo » de Esperanto. El tiaj principoj tamen ne facile dedukteblas praktikaj surterenaj agadoj tiucelen, nek fare de oficiala organizo kia KEA, eĉ malpli fare de unuopaj esperantistoj.

Ĉu, ekzemple, la Kanada esperantistaro vere provu varbi multajn novajn adeptojn inter la indiĝenaj komunumoj? Tio ne mempraviĝas. Tutmale, anstataŭi la instruadon de jam minacata denaska lingvo per tiu de Esperanto konsistigus fi-agadon, tute kontraŭan al esperantismaj principoj. Poresperanta agado nepre ne partoprenu kaj neniel kontribuu al plia apartigado de indiĝenaj popoloj for de la Kanada socio, eĉ malpli al definitiva formorto de iu ajn jam minacata indiĝena lingvo!

Se Esperanto havas rolon, tiu ĉi nur aldoniĝas al kaj venas post tiu de instruado de la denaskaj lingvoj. Esperanto rolu do kiel tria lingvo, se oni preferas, aldone al la denaska kaj al la angla / la franca kiel duaj, propre pontaj lingvoj inter Kanadanoj.

KEA, kiel nacia organizo, povas doni komencan impulson por taŭga agado, kaj indiki ĝeneralan direkton al la Kanada esperantistaro. Ne vere utilis, tamen, ke KEA elsendu tre rektpolitikan oficialan deklaron de subteno al indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj kaj poste malaperu, ĉar tio simple kuracus maltrankviligitajn kanadanajn konsciojn kaj neniel longdaŭre efikus.

KEA ja povas kontakti indiĝenajn respondeculojn el nacia nivelo por oferti helpon. Tamen komenckontakte KEA precipe ofertu atentan orelon, ĉar la indiĝenaj bezonoj estu precipe difinitaj de la indiĝenaj komunumoj mem. Daŭropovaj rilatoj inter indiĝena kaj Esperanta komunumoj nur povas baziĝi sur la indiĝenaj kondiĉoj.

Jen mi risku listumi eblajn farojn por la kanada esperantistaro, kiel ĝeneralaj sugestoj:

- ♦ kontakti la parlamentajn deputitojn por devigi registaran subtenon al la indiĝenaj komunumoj: subtenon financan, teknikan (provizi komputilojn kaj ebligi interretan komunikadon), sanan, instruan ktp (t.e. precipe subteni indiĝenajn provojn tiucelajn);
- ♦ starigi propran (aŭ partopreni jam ekzistantan) fonduson por financi specifajn projektojn, konceptitajn de la indiĝenaj komunumoj, kiuj rilatas al instruado de la denaskaj lingvoj (verŝajne por aĉeti librojn kaj diversan instrumaterialon);
- ♦ regule informi la kanadan kaj precipe la tutmondan esperantistaron pri indiĝenaj provoj kaj precipe sukcesoj plibonigi ilian lingvan situacion (t.e. diskonigi tion tutmonde);
- ♦ starigi propran (aŭ partopreni jam ekzistantan) fonduson por ĉiujare pagi vojaĝkostojn al ia nombro da indiĝenaj gejunuloj, diversloke elirantaj el tra Kanado, por grupe ĉeesti la UK-on (aŭ la IJK-n). (Tiu ĉi estu do iamaniere elektitaj de siaj komunumoj kaj estu instruataj paroli Esperanton per lokaj Esperanto-rondoj. Tiu ĉi fariĝu poste la indiĝenaj Esperanto-disvastigantoj en iliaj komunumoj.)

Entute la efiko de KEA kaj de la kanada esperantistaro estas potence granda se la movado akceptas kaj adoptas modestan rolon por si mem, ian ĉefe asociecan tamen instigan, ekzemplodonan rolon, kunagante kun aliaj pli potencaj kaj financoriĉaj sociaj kaj politikaj aktivuloj. Tia rolo paradokse ne precipe baziĝu sur instruado de kaj varbado por Esperanto. Komence ĝi klare manifestu pli la esperantisman idearon kaj malpli la lingvon mem.

Ĉiuj komentoj estas bonvenaj, per tiu ĉi *Lumo* aŭ rekte al la aŭtoro, pere de la suba retadreso.

– Jean Alain (Gatineau, QC)
retadreso : jalain2@gmail.com

De l' redaktoro

En la lasta numero de *Lumo* redaktita de mi (vintro 2005/06), aperis kelkaj artikoloj jam aperintaj en la antaŭa numero redaktita de Geoffrey Greatrex, numero kiun mi ekvidis nur post la apero de la mia. Mi pardonpetas pro tiu ripetiĝo. En la numero de vintro 2005/06 mi ankaŭ starigis defion: mi petis legantojn diveni, kiu kanada esperantisto bildiĝas plej multe en tiu numero. Unue reagis Kajmo Brent el Montrealo per retpoŝto kaj Bruce Arthur el Grenfell (SK) per „helika“ poŝto: ambaŭ ĝuste divenis ke temas pri **Normand Fleury**, kies bildo aperis en tiu numero eĉ **sep**-foje.

Kaj nun pri ĉi-numero: komputilaj problemoj kaj laboro ĉe Vikipedio (legu pri tio ĉe p. 11-14) kaŭzis ke ĝi aperu iom malpli frue ol mi unue esperis, sed finfine kolektiĝis iom da bonaj artikoloj kiuj, mi esperas, tiom interesos vin ke vi konsentos ke valoris atendi. Mi ankaŭ povas informi vin ke jam kolektiĝis (kaj redaktiĝis) iom da materialo por la sekva numero, kiu espereble aperos ankoraŭ ĉi-printempe, sed ni bezonas raportojn pri via vintra Esperanto-agado, viajn artikolojn, fotojn, poemojn. Sendu ilin, mi petas, al la redakcio per la adreso < **hoppaul@gmail.com** > aŭ al mia adreso en la membrolisto.

– Paul



Montrealo invitas!

En 2007 kaj 2008, Montrealo gastigos diversajn esperantistajn eventojn. Vi eble jam aŭdis pri MeKaRo kaj SEBO, sed al tiuj du renkontiĝoj aldoniĝos nun TAKE.

Nu, mi klarigu al vi pri kio temas! Unue, dum **majo 2007 (19a ĝis 21a)** okazos la 5-a MezKanada Renkontiĝo. Pasintjare ĝi vere sukcese okazis en Otavo danke al la Merle kaj Suzanne. MeKaRo alterne translokiĝas inter 3 urboj (Toronto, Otavo kaj Montrealo) kaj jen estos la vico de montrealanoj pretigi tiun turisman amikecan semajnfino en Esperanto.

La dua evento okazos por la sepa jaro, la Semajnfino por Esperanto kaj Biciklado (SEBO) - **1a ĝis 3a de junio** (2007).

Laŭ mia scio ĝi estas unika tia specca Esperanto-evento en la Amerikoj. Jam delonge oni biciklas Esperante tra Eŭropo dank' al la organiza agado de BEMI (Biciklista Esperanto-Movado Internacia) sed malofte en nia kontinento. Nu, en Montrealo komence de junio okazas biciklista festivalo, do, kial ne kunigi al tio esperantistan eventon! Se vi ŝatas bicikli, vi estas bonvena partopreni en tiu etosa biciklado. Memoru, tio ĉiam okazas dum la unua semajnfino en junio.

Laste, temas pri la plej grava evento, fakte multe pli granda kaj cetere pli internacia ol la 2 unuaj. Esperanto-Societo Kebekia invitas la amerikan esperantistaron al la 7-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE). Certe temos pri la plej vasta Esperanto-evento dum la lasta jardeko kaj samtempe okazos la 56-a landa kongreso de la usona nacia Esperanto-asocio (ELNA). Jam loka kongresa komitato aktivas pri trovi kongresejon, pretigi programon, decidi pri ekskursoj, vizitoj kaj multo pli. Nepre konsideru vian partoprenon, vi certe ne bedaŭros. Imagu povi diskuti, amuziĝi, lerni, kaj tiel plu, dum semajno kun kubanoj, meksikanoj, brazilanoj kaj ankaŭ kun esperantistoj el diversaj partoj de Usono kaj Kanado. Jen la datoj por prinoti : **12a ĝis 18-a de julio 2008**. Vi certe reaŭdos pri ĝi.

Mi invitas vin regule konsulti la retejon de KEA aŭ tiun de ESK < www.esperanto.qc.ca > por trovi aktualajn informojn kaj eventuale aliĝi.

Kompreneble ni bonvenigas viajn ideojn kaj vian kunlaboron al la organizado de la tri eventoj. Dum 2007-2008 Montrealo estos pli Esperanta!

Normando Fleury
Vicprezidanto de KEA

En Montrealo oni aktivegas

Krom la tut-provinca Esperanto-Societo Kebekia montrealaj esperantistoj nun kreis **kvar** novajn Esperanto-organizaĵojn! La **Montreala Esperanto-Movado** aktivas tut-urbe; vizitu ĝian retejon **esperanto-montreal.org** (estas versioj en angla, franca, kaj Esperanta lingvoj). Esperantistoj studentaj en Montrealo ankaŭ kreis klubojn ĉe tri el la kvar montrealaj universitatoj:

- **Club d'espéranto de l'UdeM** ; retadreso: udem@esperanto.qc.ca
- **McGill Esperanto Club**; retadreso: mcgill@esperanto.qc.ca
- **Club d'espéranto de l'UQAM**; retadreso: uqam@esperanto.qc.ca

Ni invitas vin partopreni la supre menciitajn eventojn kiujn organizas la montreala esperantistaro; kaj nepre memoru veni al la **14a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE)** de la 5a ĝis 8a de oktobro (2007) en Silver Bay ĉe Lake George en Novjorkio.

Novaj varoj ĉe la Libroservo de KEA

(Stato : Septembro 2006)

Jen kio novas ĉe la Libroservo de KEA en Montrealo. Ni bonvenigas viajn mendojn. La venonta katalogo papera aperos komence de 2007. Intertempe vi povas konsulti la retan katalogon je la reta adreso < <http://www.esperanto.qc.ca/katalogo/> >

- **Nova dovodo (DVD) 2006 : Esperanto Elektronike – Electronic Esperanto – Espéranto Électronique.** Fakte la dovodo estas en 20 lingvoj! Ĝi entenas la plej ampleksan kaj la plej kompletan materialon pri la internacia lingvo Esperanto. Ekzemple : kantoj, ludoj, vortaroj, kursoj de Esperanto en 24 lingvoj, filmoj, fotoj pri Esperanto-aranĝoj, revuoj, libroj kaj multe pli. Favora prezo nur : 7\$ + sendkostoj - Menu 2 kontraŭ 15\$ inkluzive sendkostojn!!!

Por komencantoj :

- **Dankon, Amiko ! :** Intriga romaneto, Claude Piron, 36p. 7\$
- **Le défi des langues, du gâchis au bon sens :** Claude Piron, 335p. 41.66\$
- **Espéranto Express :** Guide de conversation, france-esperante, Renée Triolle, 152p. 17.50\$
- **Esperanto, learning and using the international language :** Information on Esperanto with a course and basic readings, David Richardson, 368p. 27\$
- **Gerda malaperis :** Nova pli bona eldono. Lingvo-instrua romaneto, originale en Esperanto, Claude Piron, 64p. 6.30\$
- **L'homme qui a défié Babel:** biographie de L.L. Zamenhof, René Centassi et Henri Masson, 339p. 45.52\$
- **Kion ajn :** Facila rakonto, Sten Johansson, 63p. 12.40\$
- **Nouveau cours d'espéranto :** Edmond Ludwig et Renée Triolle, nova eldono 2005, 194p. 18.87\$
- **Tinĉjo en Tibeto :** bildstrio pri aventuroj de Tinĉjo, 62p. 18.90\$
- **Vivi estas miri:** Lectures pour debutant, france-esperante, Claude Piron 112p. 15\$

Por progresantoj kaj lertuloj:

- **La bona lingvo:** Kial mi kredas ke Esperanto estas bona lingvo, Claude Piron, 109p. 17.56\$
- **Esperanto sen mitoj:** Dua prilaborita eldono, Ziko Marcus Sikosek, 367p. 48.59\$
- **Hodler en Mostar :** Nova romano originale en Esperanto de Spomenka Ŝtimec, 105p.
- **La homo kiu defiis Babelon :** biografio pri L.L. Zamenhof, René Centassi kaj Henri Masson, 293p. 41.66\$
- **Manlibro pri instruado de esperanto :** Internacia ligo de esperantistaj instruistoj, 150p. 12.75\$
- **Plena manlibro de esperanta gramatiko:** Bertilo Wennergren, 696p. 30.95\$
- **Robinsono Kruso :** 'Eble ne ekzistas verko en la angla lingvo, kiu estas pli universale legata...' Daniel Defoe, 124p. 23.79\$
- **Samideanoj :** Satiroj kaj humuraĵoj pri Esperanto kaj esperantistoj, 80p. 12.40\$
- **La Zamenhof-strato :** ('Vere ĝi estas tute brila libro' H. Tonkin) Roman Dobrzynski, 287p. 28.80\$

Ne sendu monon kun via mendo, ni sendos fakturon kun sendkostoj.

Bonvolu mendi rete de < informo@esperanto.qc.ca > aŭ

Libroservo de KEA, 6358 rue de Bordeaux, Montreal QC H2G 2R8

(La libroservo havas nek telefonon nek faksilon, do ne petu ties numeron)